



7(113)
2009

Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

Bultenon redaktas: ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO
Adreso por korespondi: ul. I.Krasickiego 18-20, PL 31-515 Kraków

Zdenka Bergrová

Estas aŭtuno

Ĉe akvo staras urbo kolorita,
mallumo en ĝin jam englitas.
De pontoj ĉielarko
navigas sur lago kiel barko.
Koloroj aŭtune sangas.
Super domaĉoj
blanka laĉo
de fumo tangas.

• • •

Aŭtuna vento dornojn havas,
aŭtuna vento je klingo pavas.
Amase folioj foren flugas,
eĉ korvon rigidan la frido jugas.
Kie vi karulo, via korfavor'?
Al mi ĉi restis nura rememor'.

• • •

Tra birda pado
al vespera stelo
flugas pinto plumb-kolora.
Sub ĉiel-arkado
mi al ĝi rivelos
tion, kio ne doloras.
Super kavernoj
en ventmurmuro
flugas guaro.
Tie eksplodas stelaj lanternoj
kiel lumturoj
sur maro.
En mondo kruela
kun ora prunto
ĉiu armilo valoras.
Post pordo ĉiela,
sub frida frunto
ne plu tio doloras.

Depratempa polvo

Vivo estas efemera
vojaĝado,
hejme nin morto absolvos
post funebra sonorado.
Ni - vagantoj, depratempa polvo.
La arbon de eterneco
oni bruligos,
nin morto ĝis ostoj blankigos,
nur verdaj' de ĉiu speco
elspiras esperon.
Mi penas ĉion esplori,
perdiĝas mia fiero.
Diru, la memorarkivo:
Kion aprezi, kion priplori
je gloro de vivo?

Pri mallongeco de la vivo

Tago forflugas - estas ĝi kurta.
Reen nefluas eĉ jarcent' tumulta.
En la ĉielo rezidas
miloj
da jaroj.
Kiel kugloj rapidas.
Gelo perpleksa
prujnan juvelon
al knabin' teksas
en harojn - por belo?
Esti feliĉa, riĉa al mi ne sufiĉas.
Tempon mi volas havigi

tradukis: Jaroslav Krolupper

Zdenka Bergrová (1923-2008) ĉeĥa poetino kaj tradukistino el la rusa, parte el la angla. Amikino de E-o. Ĉiuj ŝiaj versaĵoj estas impresaj emociaj bildoj, esprimantaj sentojn de la homo en diversaj situacioj.

Krakova Societo Esperanto

La programo de la renkontoj oktobre

07.10	Bronisław Kieres:	Elementa informo pri la pola juro nuntempa kaj historia
14.10	Janina Stefaniak:	La esperantaj anekdotoj de interreto
21.10	Ada Prostacka, Stanisława Szostak, Stanisława Śliwińska:	Raporto pri XIX Ekumena Kongreso en Vroclavo
28.10	Andrzej Kołpanowicz:	La naciaj minoritatoj en Ĉinio

*Ĉi suba teksto estis prelegita dum 94-a UK en Bjalistoko. La aŭtoro Bronisław Kieres (*1941) estas doktoro de juraj sciencoj, esperantisto de 1959, ano de Krakova Societo ESPERANTO, eksa adjunkto ĉe jura fakultato de Jagelona Universitato en Krakovo, juĝisto en stato de ripozado.*

Elementaj informoj pri historia kaj nuntempa pola jura sistemo (1)

Pollando estas respubliko. En unuaj artikoloj de la nuntempa valida pola Konstitucio el 1997 oni legas : „Pola Respubliko estas komuna bono de ĉiuj civitanoj”. “Pola Respubliko estas demokratia jura ŝtato, realiganta principojn de sociala justeco, en kiu suverena aŭtoritato apartenas al Nacio. La Nacio plenumas regpovon per siaj reprezentantoj aŭ senpere. La Konstitucio estas supera (plej alta) leĝo de Pola Respubliko”.

En preambulo al tiu Konstitucio troviĝas la konstato:” Ni – Pola Nacio – ĉiuj civitanoj de Respubliko, egale kredantaj je Dio kiel fonto de vero, justeco, bono kaj beleco, same kiel tiuj, kiuj ne konfesas tiun kredon, sed tiujn universalajn valorojn elkondukas el aliaj fontoj, egalaj en rajtoj kaj devoj rilate al kuna bono - Pollando,.. ni establas la Konstitucion de Pola Respubliko kiel bazajn leĝojn por Ŝtato, (leĝojn) bazantajn je respekto por libereco kaj justeco, kunlaboro de ŝtataŭtoritatoj, socia dialogo, same kiel je principo de helpeco plifortiganta rajtojn de civitanoj kaj de iliaj komunecoj.”

Laŭ juroscienco respubliko estas formo de ŝtato kontraŭa al monarkio. En demokratia respubliko kapo de ŝtato - ŝtatestro kaj ĉiuj superaj (plej altaj) organoj de ŝtato originas el elektado per civitanaro kiel suvereno. Elektado povas esti pera aŭ senpera.

En jursciencia kaj politiksciencia (politologia) terminologio kaj literaturo oni uzas la nomon „La Tria Respubliko” kiel sinonimon por politika sistemo de nuntempa Pollando. En preambulo al la nuna Konstitucio oni legas :”kunligante al la plej bonaj tradicioj de Unua kaj Dua Respubliko”. Tiuj esprimoj postulas klarigon. Ili kunligas al historio de Pollando. De jaro 1386 Pollando estis membro de polalitova Unio, kiu estis persona, ĉar ambaŭ ŝtatoj havis kunan monarkon kaj havis interkonsenton pri kunagado en diversaj kampoj, precipe pri kuna defendo. En jaro 1569 en urbo Lublino poloj kaj litvanoj konstituis realan union, kiel federacion nomatan “Respubliko de Ambaŭ Nacioj”. Oni decidis, ke post morto de Sigismundo Aŭgusto, la lasta reĝo el litovdevena jagelona dinastio, estontaj reĝoj estos elektataj ”viritim” .Tiu latina vorto signifis: “ senpere per tuta nobelaro de Respubliko”. Oni elektadis reĝon por dumviva regperiodo. Elektita kandidato estis devigata ĵuri, ke tenos kondiĉojn, determinitajn en ”pacta conventa” (esperantlingve: paktoj interkonsentitaj), kiuj garantiis rajtojn posedatajn per nobelaro. Unu el gravaj kondiĉoj formulitaj en 1573 estis garantio por egalrajtigo de nobelaro el ĉiuj konfesoj kaj religia toleremo. Fakte tiu egalrajtigo kaj toleremo funkciis en “Respubliko de Ambaŭ Nacioj” jam pli frue, sed nobelaro volis ilin eksplicite leĝe konfirmi, konante situacion, kiu ekzistis en tiu tempo en iuj aliaj landoj en Eŭropo kaj elektante novan reĝon por lando en kiu vivis kune katolikoj, ortodoksanoj, luteranoj, kalvinanoj, judoj kaj homoj de aliaj religioj, ekzemple polaj tataroj, kiuj estis mahometanoj. Polaj tataroj loĝis kaj ĝis nun loĝas proksime al Bjalistoko. Bedaŭrinde tiuj noblaj ideoj de toleremo ne ĉiam estis poste respektataj kaj kvankam la rompoj de ili estis relative raraj tiaj eventoj ĉiam restas hontindaj.

Religia toleremo, aŭtonomio kaj ekonomiaj rajtoj por Judoj estis garantiitaj jam pli frue, en 1264-a en privilegio eldonita per princo Boleslavo La Pia kaj ripetitaj en 1334-a kaj poste per reĝo Kazimiro La Granda. Tiu jura situacio kaŭzis, ke judoj ĉikanataj en iuj aliaj landoj de Eŭropo de 14-a jarcento volonte enmigradis al Pollando kaj de XVII jarcento Respubliko de Ambaŭ Nacioj estiĝis la plej granda en Eŭropo amasiĝo de Judoj.

Paktoj interkonsentitaj el 1573-a rajtigis nobelaron al malobeigo, se reĝo ne gardus ĵuritajn kondiĉojn. Do la jura situacio de reĝo en “Respubliko de Ambaŭ Nacioj” de tiu tempo estis fakte multe pli proksima al jura situacio de prezidentoj en kelkcent jaroj posta periodo en demokratiaj landoj ol al jura situacio de reĝoj en tiuj eŭropaj ŝtatoj, kiuj en la sama tempo estis absolutismaj monarkioj.

Jam pli frue, en 1430 reĝo Władysław Jagiełło eldonis privilegion nomatan latinlingve “Neminem captivabimus” (esperantlingve: “ni neniun malliberigos”), kiu garantiis al nobelaro, ke nobelo povas esti malliberigita nur per decido de juĝo. La signifo de tiu leĝo estis simila, kiel signifo de “Habeas Corpus Act” (esperantlingve: “havu korpon akto”) en Anglio el 1679.

En jaro 1505-a oni eldonis la leĝon nomatan latinlingve „Constitutio Nihil Novi” (esperante: Konstitucio Nenio Nova), kiu al Sejmo (Parlamento) garantiis senesceptan, ekskluzivan rajton al decidado pri novaj leĝoj. Termino “Konstitucio” en Unua Respubliko signifis ĉiun leĝigaĵon de Sejmo. La senco de tiu termino konvenas al senco de nuntempa termino “leĝo eldonita per parlamento”. De tiu tempo politika sistemo de Pollando estis nomata “nobelara demokratio”, ĉar nur nobelaro havis plenecon de politikaj rajtoj. Ĉiuj nobeloj estis leĝe egalrajtaj, kion esprimis pola proverbo “la nobelo en sia kabano estas egala al vojvodiestro”. Nature, leĝa egalrajteco ne ŝanĝadis fakton, ke reale aliajn eblecojn havis riĉaj ol malriĉaj. En tiu tempo nobelaro en Respubliko de Ambaŭ Nacioj ampleksis cirkaŭ 10% da loĝantaro. Plenajn politikajn rajtojn havis tiam nur viroj, do fakte politike plenrajtigita estis tiam cirkaŭ 5 % da loĝantaro, sed en tiu tempo kaj ankaŭ en multaj postaj jaroj tia procento de politike plenrajtigita loĝantaro estis en la Respubliko de Ambaŭ Nacioj pli alta ol en iu alia lando en tuta mondo.

Demokratio funkcias je sama nivelo, kia estas politika kaj morala nivelo de “demos” (en antika greka lingvo= popolo, civitanaro). En pola Sejmo en “Unua Respubliko” jam de multaj jaroj formale estis deviga la principo, ke ĉiuj decidoj devis esti akceptataj unuvoĉe, do eĉ unusola kontraŭa voĉo malebligadis akcepton de leĝo. Fakte tamen, dum longa tempo – kelkcent jaroj - ĉiam oni atingadis kompromison. Konsekvence rajto al “liberum veto” (esperantlingve: “libere mi kontraŭas”) ne estis uzata. Kiam ekestis kaj plifortiĝis socitavolo de magnatoj, ili el egoismaj motivoj ne estis interesitaj en forta ŝtato. Ankaŭ multaj aliaj nobeloj ne volis tro fortan reĝaŭtoritaton, timante, ke tio povas konduki al “absolutum dominium” (latinlingve: aŭtoritato absoluta), konante situacion, kiu en tiu tempo ekzistis en absolutismaj monarkioj. Samtempe najbaraj ŝtatpotencoj estis interesitaj en malfortigado de “Respubliko de Ambaŭ Nacioj”. En tiu situacio “liberum veto” kiel konsekvenco de principo de unuvoĉeco de mezo de 17-a jarcento paralizadis necesajn reformojn kaj gvidis paŝo post paŝo al malfortigado de “Respubliko de Ambaŭ Nacioj”. Tio finiĝis katastrofe per pereado de ŝtato en fino de XVIII jarcento.

La unua Konstitucio de “Respubliko de Ambaŭ Nacioj” en hodiaŭa signifo de tiu ĉi termino, do kiel fundamenta leĝo de ŝtato, kun kiu ĉiuj aliaj leĝoj devas esti konkordaj, estis akceptita la 3-an de majo en 1791 per Sejmo kaj Senato kune konferantaj. Ĝi estis dua en la tuta mondo Konstitucio, la unua estis Konstitucio de Usono el 1787. La “3-a maja Konstitucio” deklaris, ke suvereno estas Nacio, kvankam kiel plenrajtigitan komprenis nur viran nobelaron. Entenata en tiu Konstitucio regulo de tridivido de ŝtataŭtoritatoj, bazanta je pensoj de John Locke kaj Charles Montesquieu estis kontraŭa al situacio en multaj absolutisme regataj landoj en 18-jarcenta Eŭropo kaj ankaŭ kontraŭa al teorio de monolita ŝtataŭtoritato, funkcia en 20-a jarcento en faŝismaj kaj komunismaj landoj. La Konstitucio el 3-a majo 1791 likvidis principon de unuvoĉeco, sekve do “liberum veto” kaj reduktis influon de grandaj magnatoj je ŝtataj aferoj, pligrandigis rajtojn de urbanaro kaj promesie por kamparanoj, “protektion de juro kaj registaro”.

Skribante pri “la 3-a maja Konstitucio” Karl Marx konstatis, ke ĝi estis unika en historio ekzemplo, ke privilegioj propravole limigis siajn privilegiojn. Historio montris, ke apud saĝaj kaj penetremaj troviĝis ankaŭ maltrafaj rimarkoj de Marx kaj iuj liaj konceptoj evidentiĝis eraraj, sed tiu lia rimarko ŝajnas esti citinda.

Tiu "3-a maja Konstitucio", provo de esenca reformo de ŝtato, havis nur tre mallongan periodon de valideco ĉar en 1795 "Respubliko de Ambaŭ Nacioj" ĉesis ekzisti dispartigita perforte inter Prusio, Rusio kaj Aŭstrio, sed ideoj de "3-a maja Konstitucio" modernaj kaj progresemaj en ilia tempo estas valoraj atingoj en historio de politika penso de ambaŭ nacioj: litovoj kaj poloj. Unu el konsekvencoj de la unua mondmilito estis falego de imperioj de Prusio, Aŭstrio kaj Rusio kaj reaktiro de sendependeco per nacioj en Meza Eŭropo, interalie per Poloj. Kiel simbolan daton de tiu fakto, do de komenco de Dua Pola Respubliko oni traktas en Pollando la 11-an de novembro de 1918. En tiu tago al Varsovio alvenis, liberigita el prusia malliberejo, Jozefo Piłsudski, kreinto de Polaj Legioj, kaj transprenis regpovon de tiel nomata Regenteca Konsilantaro. Pro tio nun tagoj de 3-a Majo kaj 11-a Novembro estas Tagoj de Pola Nacia Festo.

Unu el unuaj leĝoj de tiama Pollando estis Leĝo pri Elektoregularo al Sejmo (Parlamento), eldonita 28-an de novembro 1918 en kiu oni konstatis, ke elektorajton havas polaj plenkreskaj civitanoj senkonsidere al sekso. La plenan politikan egalrajtecon de ĉiuj civitanoj, senkonsidere al sekso, socitavola deveno, nacieco aŭ havaĵa ŝtato deklaris ankaŭ unua Konstitucio de Dua Pola Respubliko el 1921, do pli frue ol en multaj aliaj landoj. La Dua Pola Respubliko ekzistis ĝis septembro de 1939, kiam en rezulto de agreso germana (1-an de septembro) kaj soveta (17-an de septembro) Pollando estis dispartigita inter nazia Germanio kaj komunisma Sovetunio.

Kiam la dua mondmilito ankoraŭ daŭris la ŝtatestroj de tri aliancitaj potencegoj de antifaŝisma koalicio nome Usono, Britio kaj Sovetunio dum kelkaj konferencoj en Moskvo, Teherano kaj Jalta interkonsentis, parte silente, parte klare, ke teritorioj, el kiuj la germanajn agresintojn forpelos soveta armeo post milito restos zono de soveta influo. En konsekvenco de tiu interkonsento civitoj loĝantaj sur tiuj teritorioj havis fakte nenian eblecon decidi pri ŝtatlimoj, translokigoj de loĝantaro aŭ politika kaj jura sistemo de siaj landoj. La Konstitucio el 22-a de julio 1952 laŭ kiu oni konfirmis ŝanĝon de politika sistemo kaj eĉ Pollando ŝanĝis nomon je "Pola Popola Respubliko" estis prilaborita laŭ soveta ŝablono kaj instruo. La ŝtatlimo inter Pollando kaj Sovetio determinita per "Granda Trio" jam dum Konferenco en Teherano en 1943 jaro, estis, kun malgrandaj ŝanĝoj, preskaŭ la sama, kiel tia, kiun determinis kaŝa protokolo al pakto Ribbentrop-Molotow en 1939. Por kongresanoj en Bjalistoko tiu malgranda ŝanĝo estas tamen grava, ĉar Bjalistoko restis en Pollando.

La specialistoj pri juro, historio kaj politologio konsentas ke ekziston de Tria Pola Respubliko oni devas kalkuli de jaro 1989, ĉar en tiu jaro pola civito reakiris eblecon de memdecido. Kiu fakto en tiu ĉi jaro estis la plej konsiderinda, do, de kiu el ili oni devus kalkuli komencon de „Tria Respubliko” estas temo de diskutoj, ĉar liberigado de Pollando el komunisma sistemo estis procezo, kiu bezonis tempon, ĉar ĝi ne estis revolucia sed evolucia. La plej gravaj eventoj sur tiu vojo: interparoloj de „Ronda Tablo”, unua, parte libera, elektado al Sejmo 4-an de junio 1989 kaj ekesto de unua registaro kun nekomunisma ĉefministro Tadeo Mazowiecki la 12-an de septembro 1989 okazis ĉiuj pli frue ol malkonstruado de muro en Berlino aŭ ŝanĝoj en Hungario aŭ tiama Ĉeĥoslovakio.

Nuntempa ŝtata strukturo de Pola Respubliko bazas je tridivido kaj ekvilibro de ŝtataŭtoritatoj: leĝodona aŭtoritato, ekzekutiva aŭtoritato kaj juĝaŭtoritatoj. Leĝodonan aŭtoritaton plenumas Sejmo kaj Senato. Ekzekutivan povon plenumas Prezidento kaj Registaro (Konsilantaro de Ministroj). Juĝaŭtoritaton plenumas: juĝoj kaj tribunaloj.

Laŭ nuntempa pola Konstitucio el 1997 aktivan elektorajton al ĉiuj ŝtataŭtoritatoj havas polaj civitanoj, plenkreskuloj, tio signifas personoj, kiuj finis 18 jarojn de sia vivo. Elektado al ĉiuj ŝtataŭtoritatoj estas senpera, ĝenerala, egala kaj en sekreta voĉdonado.

Kapo de ŝtato (ŝtatestro) estas Prezidento, kiu estas elektata por kvinjara kadenco. La sama persono povas esti elektita nur dufoje. Kandidato devas esti minimume 35 jaraĝa. Sejmo kaj Senato estas elektataj por 4-jara elektperiodo. Polaj civitanoj havas pasivan elektorajton al Sejmo se ili estas minimum 21 jaraĝaj kaj al Senato 30 jaraĝaj. 460-persona Sejmo estas elektata laŭ proporcia regularo, kun 5% -a elektsojlo kaj kun metodo de d'Hondt por transkalkulado de akiritaj per partioj voĉoj je mandatoj. 100-persona Senato estas elektata laŭ plimulta regularo.

(finota)

Bronisław Kieres